

# NiaBulteno

ISSN:0871-9241

OKTOBRO-DECEMBRO 2004 OUTUBRO-DEZEMBRO • Numero 86

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio  
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto


Rua Dr. João Couto, 6-r/CA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217141359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt



## "A": novigon kun stabilo

pĝ.4

La nuna skipo ree prezentiĝas kiel kandidataro "A" por la mandato 2005-2007. Pluraj nomoj restas, pluraj novas: Prezidantoj (estrara kaj asemblestaba), kaj kasisto kaj aliaj estraranoj. Neniu kontraŭvole, neniu manke de pli bona: Jen skipo por stabile novigi!




## Ree al kotizo de 1972!

pĝ.6

La Ĝenerala Asembleo balotos baldaŭ pligrandigon de la kotizo: 25,20 €, iom sub la maksimumo de 1973, eku. 31,27 €! Estas ankaŭ balotota propono "aŭtomatigi" kotizpligrandigojn ĉiujare por kompensi la inflacion.


## Blade Trinity: vampirĉasado en esperanto!



## Azevedo do Carmo

Barreiro oma-  
gis per eldono  
unu el siaj plej  
elstaraj idoj:  
poeto, politikisto  
kaj esperantisto...

pĝ.3



## Ducento staras sojle!

La unuan fojon post 1997, la membraro ekkreskas en 2005: Kial do?... Legu pri nootipa varbado de membroj kaj pri la kondiĉoj de plia kresko sur

pĝ.8

**Kunveno de la Ĝenerala Asembleo: la 19-an de Marto, sideje**

*Nia Bulteno* (informa bulteno de  
Portugala Esperanto-Asocio)  
Numero 86 (okt.-nov. 2004)

ISSN:0871-9241

**Redaktoro:**

António MARTINS-Tuválkin  
**Eldonkvanto:** 400 ekzempleroj  
**Abono (4n-roj, nur ekster PT):**  
8-ono de landa MA de UEA  
Unuopa ekz. (83-86): 5,00 €  
(aliajn n-rojn laŭpete);  
PDF-e havebla el <http://www.esperanto.web.pt/nb.html>

**Limdato por NB87:** 2005.03.19

**Finkompostita en:** 2005.02.27



Portugala  
Esperanto-  
Asocio  
Associação  
Portuguesa de  
Esperanto

(*peessoa colectiva de utilidade pública*)

☎ sabate 15:00-19:00; sideje  
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A  
PT-1500-239 LISBOA

☎ +351 217 141 359 0

☎ +351 217 933 924

✉ <info@esperanto.web.pt> aŭ

<portugala@esperanto.web.pt>

🌐 <http://www.esperanto.web.pt/>

**CAE:** 91331 **NIF:** 501 547 312

**Fondita** en 1972.04.25

**Landasocio** de U.E.A. ekde 1979

**K-ano A:** Faria de BASTOS

**Membroj:** 122(+53) en 2005.02.17

**Monata kotizo:** 1,50 €

(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:

1,00 €; malriĉuloj: 0,00 €)

**Aniĝkoto:** 2,50 €

**Pagojn al:** (IBAN: PT50...=) NIB:

0035 064 000 025 961 430 49

**GVIDORGANOJ:** (ekde 2003.03.29)

**Ĝeneral-Asemblea Stabo:**

**Prezidanto:** José MARTINS

**Sekretarioj:** Miguel OLIVEIRA

Werther SACRAMENTO

**Estraro:**

**Prezidanto:** Faria de BASTOS

**Vicprezidanto:** MARTINS-Tuválkin

**Sekretario:** Alcino ALVES

**Kasisto:** A. da SILVA ALMEIDA

**Voĉdonantoj:** Gonçalo NEVES

Alexandra G. e Paz

Iuri GASPAS (anst.)

**Kontrol-Komitato:**

**Prezidanto:** Vítor MARQUES

**Revizoroj:** Francisco MELO

Manuel RUAS

**Farendas iame** stilgvidilo de  
*Nia Bulteno*. Per ĝi, krom grandigo de la redak-  
toro vanto, eblos (maksimuke kaj se necese) fin-  
fine anstataŭigi la redaktoron sen ŝanĝoj en la  
redaktaĵo, kaj (minimume) kompreni la motivon  
de iuj malglataĵoj kaj strangaĵoj, oftaj sur la paĝoj  
de *Nia Bulteno*. Ĉiprie mi ree memoris redak-  
tante la nunan numeron: Eĥ!, tiom da artikoloj  
kun “inicialego” kaj aŭtornomo komence. Kial?  
Ĉar enestas ĉifoje ne nur nome signitaj kronikoj  
kaj noticoj indaj nur je du-tri-litera parafo: Jen  
ankaŭe legeblas strategiaj “aŭtorecaj” artikoloj —  
kiujn iuj nomus gravaj. Ek’ do al lego kaj reago  
opinipropra (skriba — aŭ parola, dum la baldaŭa  
assemblea kunveno): Ja ĉinumere dismultiĝis plur-  
role — estrarane, “fakule”, kandidate — via *red.*

**NEBALOTITAJ POSTENOJ:**

**Instruado:** (vakas)

**Libro-Servo:** Silva ALMEIDA

**Biblioteko:** Werther SACRAMENTO

(periodaĵoj) Wilson BRIGIDO

(eltondaĵoj) MARTINS-Tuválkin

(sonregistroj) Carlos MOREIRA

(diversaĵoj) (vakas)

**Fotarkivo:** Olga ALMEIDA

**Subvencioj:** (vakas)

**Gazetaro:** (vakas)

**Ret- kaj komput-aferoj:**

Nuno MAGALHÃES

A. MARTINS-Tuválkin

Luís OLIVEIRA

**Sidejmastrumo:** Pedrosa ALVES

**HONORAJ MEMBROJ:**

António da SILVA ALMEIDA

Alsácia Fontes MACHADO ☺

Manuel de FREITAS ☺

Alberto Pedro da SILVA ☺

Adelino Franco SIMÕES ☺

Manuel de Sousa TEIXEIRA ☺

**LOKAJ SEKCIJ:**

**PLUS** — Portugala Loka Unua

Sekcio (nordokcidenta sekcio)

**Repr.:** Nuno MAGALHÃES

**Fond.:** 2002 **Membr.:** 15(+6)

✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ªA

PT-4150-589 PORTO

☎ +351 917 721 868

✉ <plusanoj@clix.pt>

🌐 [http://www.esperanto.web.](http://www.esperanto.web.pt/plus.htm)

pt/plus.htm

**JUNULARA SEKCIO:**

Portugala Esperanto-Junularo

*Jovens Esperantistas de Portugal*

**Fond.:** 1993 **Membr.:** 11(+18)

(L.S. de TEJO ekde 1996)

🌐 [http://www.esperanto.web.](http://www.esperanto.web.pt/pej.htm)

pt/pej.htm

✉ <pej@esperanto.web.pt>

☎✉📠: ĉe P.E.A.

**ALIAJ ORGANIZOJ:**

**Nogeso** — Norda Grupo de

Esperanto-Studado

☎ kafejo *Estrela d'Ouro*; str. *Fá-*

*brica*; Oporto (antaŭaverton)

✉ <esperanto@mail.pt>

🌐 <http://www.nogeso.cjb.net/>

☎✉📠: ĉe PLUS

**Saluton!** — *Cooperativa dos Ami-*

*gos do Esperanto e da Natureza*

☎ 2-an dim. ĉ.m. 15:00; Cacém

✉ Avenida Bissaia Barreto, 2

PT-3360-191 PENACOVA

✉ Rua do Miradouro, 12

PT-2735-300 CACÉM (SNT)

**LANDAJ REPRESENTANTOJ:**

**U.E.A.:** (vakas)

**ILEI:** João SANTOS (deleg.)

**E.E.U.:** Faria de BASTOS

**TEJO:** Ricardo TOSCANO (A-kom.)

**ILERA:** Francisco MELO (CT1CGE)

**EJA:** Faria de BASTOS

**SAT:** Pedrosa ALVES (kotizp.)

**IKEK:** Alcino ALVES

**IKUE:** Salete dos SANTOS

MOVADO:

## Gastoj voj-aĝas

Turnea paŭzo

Juna ĵazkontrabasisto Thomas MORGAN, el Usono, vizitis nian sidejon dum sia restado en Portugalio, martmeze de 2004; li koncertis en Lisbono (*Hot Club*), Leiria kaj Torres Vedras. AMT

Varbon okcidente

Du semajnoj malpost la renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Junularo en *Mataró* (ĉ. 70 partoprenantoj; vd. NB 87) vizitis Portugalion unu el la organizantoj, Roger PRIETO de la Torre, la semajnon 2005.02.18-27. Li vizitis Lisbonon (inkl. sidejon), Koimbron, Avejron kaj Oporton, ĉie kontaktante lokajn junajn esperantistojn. La gastigadon kaj ĉiĉeronadon prizorgis Alexandra PAZ. AMT

LINGVO:

## Almejdaj vortaroj ree haveblas!

Finfine, post longa serĉado, estis trovita esperdona ebleco pri reeldono de la verkoj *Dicionário de Esperanto-Português* kaj *Dicionário de Português-Esperanto*, de António da Silva ALMEIDA (vd. NB 76:7-8). Sekve, oni alvokas al:

- **Antaŭmendoj:** Laŭ la antaŭa prezo (se necese korektota, kredite aŭ debete); tiuj estos prioritare ekspeditaj kiam la eldono pretos.
- **Sugestoj kaj korektoj:** Se vi trovis mistajpon en la antaŭa eldono, b.v. sciigi nun. AMT

MOVADHISTORIO:

## João Azevedo do CARMO omaĝita

Laŭ atentigo de loka esperantisto Dr-ro Inĝ. Leal da SILVA, en 2005.02.12

A. MARTINS-Tuválkin (reprezente de P.E.A.) ĉeestis en la Barejra Municipa Biblioteko (ejo de la XVII-a R.P.E., en 1997) la lanĉon de biografia libro kompilita omaĝe al la barejra plurfaceta filantropo kaj humanisto João Azevedo do CARMO. Sub la titolo *Eu, meus senhores, amo a igualdade* (= «Mi, gesinjoroj, amas la egalecon»; ISBN:972-98127-6-4), ĝi enhavas verkaĵojn, ĉefe poemojn, kaj biografiajn notojn. Estas sekcio pri lia esperantista vivo (pĝ. 169-176 kaj menciojn dise; iom da mistajpoj): Azevedo do CARMO aktivis kiel verkisto kaj tradukisto (publikigis i.a. en *Portugala Esperantisto*, ĉ. 1936) kaj ankaŭ en la loka klubo «Progresemaĵoj», i.a. publikigante portugallingvajn informajn tekstojn en la loka gazetararo.

Azevedo do CARMO forpasis 87-jara en 1986. Kvankam li mem neniam membriĝis en P.E.A. (fondita en 1972), tion faris lia filino Isabel do CARMO, mem konata politikisto kaj kuracisto. Tiu kunlaboris en la kompilo de la ĵus lanĉita libro, same kiel la konata fotisto Eduardo CABRITA, ankaŭ familiano de Azevedo do CARMO. AMT+LS



ASOCIO:

## Kandidataro "A" por novigo kun stabilo

■ *António MARTINS-Tuválkin*

**K**andidatiĝas por la mandato 2005-2007 de niaj Asociaj gvidorganoj la sama skipo, sub la nomo Kandidataro "A" (verŝajnas ke, kiel kutime, ne estos iu kandidataro "B"...). Temas pri listo da konataj nomoj, kun kelkaj aldonaĵoj kaj nemultaj lokŝanĝoj:

La plej evidenta novaĵo estas la interŝanĝo de postenoj inter José MARTINS kaj Faria de BASTOS, la du prezidantoj (de la Estraro kaj de la Asemblea Stabo, respektive). Tio respondas al delonga volo de ĉilasta, kies «profesia vivo lasttempe ne permesas inde okupiĝi pri la estrarprezidentaj devoj».

Kvankam J. Martins mem ne estas nenifaranto (ja instruisto kaj esploristo en la Avejra Universitato), lia aktivigo kiel estrara prezidanto konsistigas farindan eluzon de liaj movadaj kapabloj. Li estis jam estrara vicprezidanto en 1993-1995; dumaj ŝanĝoj en la komuniktekniko, movada maturiĝo kaj oftaj venoj al Lisbono estas ŝanĝitaj donitaĵoj por rea eksperimento.

Kune kun la plua estraraneco de Alexandra PAZ, kaj pro la reprezentanteco de Nuno MAGALHÃES, jenas la malplej lisbona skipo kiu iam ajn kandidatiĝis por estraro de nia Asocio.

La postenenon Kasisto plenigos nova homo: Miguel BOIEIRO, nova esperantisto de la "Alkoĉeta bando" (vd. ekz. NB80:8), relative juna emerita kontisto. Per tiu enposteniĝo retiriĝas al "ora breto" António da

KANDIDATARO "A":

Ĝeneral-Asemblea Stabo:

Prezidanto:

(↓) M. Faria de BASTOS

Sekretarioj:

(↘) Werther SACRAMENTO

(↘) Manuel RUAS

Estraro\*:

Prezidanto:

(↘) José M. MARTINS

Vicprezidanto:

(↘) A. MARTINS-Tuválkin

Sekretario:

(↙) Alcino R. ALVES

Kasisto:

(↓) Miguel BOIEIRO

Voĉdonantoj:

(↘) Alexandra G. e PAZ

(↗) Wilson BRÍGIDO

(↗) Hugo LOURENÇO

Kontrol-Komitato:

Prezidanto:



(↓) A. da Silva ALMEIDA

Revizoroj:

(↗) Vítor MARQUES

(→) Francisco MELO

(\* Notendas ke konstante plenrajte anas en la estraro la sekciaj elektitaj reprezentantoj (aparta balotado). Momente tiuj estas nur unu, Nuno MAGALHÃES (↗), representante de la loka sekcio "Plus".



A. da Silva ALMEIDA, Alcino Alves, M. Faria de BASTOS, Miguel BOIEIRO

Silva ALMEIDA, kiun nek honormembreco nek defia malsano fortimigas el la necesaj laboroj — ja li plu oficas kiel Libro-Servestro (posteno nebalota) kaj en la Kontrolkomitato.

Aldone, du pliajn novaĵojn en la estraron: Hugo LOURENÇO, nova sed jam relative tre sperta esperantisto, kaj Wilson BRÍGIDO kiu, kun 20 jarojn da esperantisteco en Portugalio, vidas sian movadan envolviĝon kreski eksponencie.


Herede el antaŭ-aj mandatoj restas ankoraŭ estraranoj Alcino ALVES kaj António MARTINS-Tuválkin, revizoro Francisco Melo (plia iama kasisto en la Kontrolkomitato), kaj Asemblestaba sekretario Wether SACRAMENTO. Al ĉilasta organo migras kiel ankaŭ sekretario Manuel RUAS.

Estos averaĝe tre juna gvidantaro, speciale la estraro: nur 41 jarojn, simila nur (krom al la ĵusaj) al tiuj de 1991 kaj de 1989 (ambaŭ 43 j.).


La sola malprogreso rilatas al la ĉesto denur unu virino inter 13 kandidatoj (8%), kio estas eĉ pli malgranda ol la (eta) ina ono de nia membraro (28%).

Notindas ke neniu el la kandidatoj enestas kontraŭvole aŭ kiel anstataŭaĵo de iu «pli bona»...«, kiu tamen venos ne» (†).

Kiel antaŭe, sed pli kaj pli firme, restas ekster la kandidataro nemalvasta grupo da tre kapablaj homoj: El tiuj, pluraj okupiĝas pri pli aŭ malpli gravaj taskoj de la Asocia laboro, aŭ alikampe en movada agado; aliaj, neaktivaj, restas kiel potencialo en la “banko” de homaj rimedoj kiun plej taŭge aktivigi al komuna celo estas la esenca tasko de la baldaŭ elektotaj gvidorganoj. ■




*Wilson BRÍGIDO, Hugo LOURENÇO*





*Nuno MAGALHÃES, Vítor MARQUES*



*A. MARTINS-Tuválkin, José M. MARTINS*



*Francisco MELO, Alexandra G. e Paz*



*Manuel RUAS, Werther SACRAMENTO*

(†) Ĉi cito omage al António VARIACÕES (1944-1984).

ASOCIO:

# Kotizojn kontraŭ la inflacio

■ António MARTINS-Tuválkin & António S. ALMEIDA & Vítor Luís MARQUES

Estos proponita de la asocia estraro por aprobo dum la baldaŭa kunveno de la Ĝenerala Asembleo pligrandigo de la nuna kotizvaloro kaj regularo pri estonta regula ŝanĝo.

Laste pligrandiĝis nia kotizo en 2003.03.23, de 14,40 € al 18,00 €. Kiel kutime, pro la inflacio, la reala valoro de tiu monsumo plimalgrandiĝis ĉiujare: Tiuj 18,00 € valoris tiam tiom, kiom 19,71 € hodiaŭ. Tio estas la kutimo: Oni aprobas kostigon de la kotizo kaj la inflacio ĝin erodas — tial la “segila” profilo en la ĉisuba grafikaĵo...


Kio tamen evidentiĝas per analizo de la evoluo de nia kotizvaloro estas ke la originalan sufiĉe altan koston de la unua kotizgrandigo (nune ekv. 31,27 €!) la inflacio en 1973-1981 etigis tre rapide al ĉiama minimumo (ekv. 6,83 €!), kiun la postaj grandigoj aprobitaj asemblee nur iom post iom (kaj tute ne plene) kompensis.

“Sur la tablo” de nia baldaŭa ĝenerala kunveno estas propono grandigi la nunan ko-

tizon de 18,00 € al 25,20 € (kaj ne 24,00 €, kiel misindikite en NB84). Tiu grandigo proksimigas la kotizon al tiu iama nivelo de 1972; laŭstatute ĝi estas oportune dividebla po normala monata kotizo (2,10 €) kaj po dutrione rabatita kotizo (1,40 €; vd. pĝ. 2).

Aldone estos submetita al asemblea aprobo regularon pri kotizpligrandigo kiu celas “ebenigi” la menciitan segilprofilan evoluon de la reala kotizo per automata ĉiujara pligrandigo laŭ la oficiala inflacia koeficiento de ĉiu ĵusfiniĝinta jaro (*Índice de Preços*

**Grafikaĵo:** Komparo de la kotizoj laŭ la nuna valoro. Inflacio laŭ INE (I.P.E.).




ao Consumidor, kalkulita kaj januar-fine publikigita de Instituto Nacional de Estadística).

Ekzemple: se komence de 2006 la oficiala inflacio estos 3,8%, la tiama monata kotizo ŝanĝiĝu aŭtomate de 2,10 € al 2,25 €, per “rondigo” de ĉ. 2,18 € al trionigebla ono de 0,00 €. (Se estos malpli ol 3,8%, aplikiĝos §4).

Laŭ tiu ĉi regularo ne plu necesos aprobi kotizgrandigon asemblee kun la nura celo kompensi la inflacion: Estontaj ŝanĝoj rilatos nur al la absoluta kotizvaloro.

Tial ĉi la estraro devas rutine prizorgi la plenumon de tiu ĉi regularo, ja alio estus efektiva ŝanĝo de la kotizvaloro, kiun kutime decidas la Asembleo (kaj tial la noto de §5). ■



## ASOCIO:

### Regularo pri inflacikompensa kotizaktualigo (propono)

0. Tiu ĉi regularo celas konservi laŭeble konstantan la kotizan valoron per ĉiujara kompenco de la inflacio.
1. Komence de ĉiu jaro, laŭeble frue, devas la Estraro informiĝi pri la pasintjara inflacio, publikigita de Instituto Nacional de Estadística kiel Índice de Preços ao Consumidor, kaj konsideri ĝian valoron kiel koeficiento esprimita laŭ centonoj.
2. Tiun koeficiento oni uzu por modifi la validan kotizon, obligante tiun per la sumo de ĝi kun 100%. **Noto:** Se la inflacia koeficiento estas negativa, t.e., se okazis malinflacio (=deflacio) en la antaŭa jaro, ĝia sumo kun 100% estas malpli ol 100% kaj la obligo de tio kun la valida kotizo rezultigos ties malkreskon. Ankaŭ tio estas laŭ la celo de tiu ĉi regularo.
3. La modifita kotizo devas obei la regularon ke ĝi estu oportune dividebla per tri, por facila kalkulo de la rabata kaj aniĝa kotizoj. T.e.: la monata valoro konsistu el senfrakcia nombro da eŭrdekonoj — la rezulton oni rondigu al la plej apuda tia valoro.
4. Se post “rondigo” la kotizo restus senŝanĝa (post jaro kun tre malgranda inflacio) oni konservu tiun nerondigitan valoron kaj uzu ĝin kiel bazon en la sekva jaro.
5. Inflacikompensa kotizaktualigo devas esti raportita en Estrarkunveno kaj uzata de tiam senescepte por kvitanci ĉiujn postajn kotizpagojn.

**Noto:** La Estraro ne rajtas decidi ne apliki tiun ĉi regularon.

*La unuan fojon post 1997,  
la membraro ekkreskas en 2005:  
Kial do?... Jen pri novtipa  
varbado de membroj  
kaj pri la kondiĉoj de plia kresko.*

ASOCIO:

## Ducento staras sojle

■ António MARTINS-Tuválkin

### Kiajn membrojn por nia Asocio?

Laŭ mia interpreto de ĝia celaro, nian asocion ideale membru ĉiuj esperanto-parolantoj (aŭ “-uzantoj”) loĝantaj en Portugalio, kaj ankaŭ eksterlandloĝantaj portugalaj esperantistoj. Membreco estas laŭ mi pli ol rimedo enspezi (kotizojn): ĝi estas ligo de unuopulo al komunumo.

La ecoj de tiu ligo rilatas al oniaj ideoj pri la laboro de la asocio mem (kaj do diskutendaj ne ĉiteme), sed laŭ mi nepras toleri kaj ebligi vastan diversecon je la kielto membri: Ne nepre ĉiuj estu plentempaj aktivegaj movadestroj, strategoj aŭ instruistoj — la asocio devas provizi lokon por ĉiaj roloj kaj por ĉiaj intensoj je rolado.

### Nek framasone nek senrezone

Antaŭ la demando kiel varbi novajn membrojn (kaj kiajn, kiam k.t.p.) diversaj responsuloj en P.E.A. alprenis tre diversajn respondojn: Ofte, speciale en la plej fruaj tempoj de nia Asocio, oni tro facilanime akceptis kiel membrojn homojn kies rilato al esperanto estis eĉ ne pli ol tre svaga (tre ofte simple amikoj de esperantistoj) — espere ke membreco firmigos la lernemon, aŭ ke almenaŭ venu al asocio kotiza enspezo — «ja se mono ne odoras, ĝi ankaŭ lingvon ne havas, ĉu ne?»... La (misa) rezulto estas konata (vd. NB83:6-7 aŭ NB66:14-15).

Kontraste (kaj iel reage al la supre

menciita strategio) iuj insiste rifuzis “alsturmi” membriĝuntojn, timante aspekti kiel anavida, ĉio-gluta sekto. Tiu mala aliro kaŭzis nemalofte ĉe eklernintoj la miskomprenon ke P.E.A.-aniĝo iel postulas longan provadon kaj inicadoŭn — ĉe iuj tio kaŭzis eĉ apartiĝon de la movado, konstante ke tamen klare ne tro kapablaj homoj estas ja asocioj sed «min neniu invitas»...

La ĝusta vojo, laŭ mi, estas ia mezo inter tiuj ekstremoj: Ni proponu membriĝon nur al minimume interesataj homoj, sisteme sed ne postule.

### Kial entute membri?

Jen malnova demando kiu postulas ankaŭ novajn respondojn — dum multaj el la malnovaj daŭre validas!

El tiuj certe **ne eksmodiĝis** iuj el la klasikaj “altruismaj” argumentoj, nome pri «apogo al la asocia agado» pere de kotiza mono — socie prestiĝa konsumismo kaj elspezemo favoras tion.

Aliflanke la tipa esperantisto fariĝis pli postulema kaj nedependa ol iam antaŭe: Neniu plu bezonas asoci(anec)on por eksterlandajn kontaktojn, kaj eĉ ne por mendojn aŭ transpagojn. Trovi do praktikajn avantaĝojn esti membro de Esperanto-Asocio (argumente kaj reale) restas **aktuala defio**:

Iuj estas relative simple kreeblaj en P.E.A.: Sufiĉas konkretigi la statusan preskribon ke membroj rajtas



avantaĝon aŭ prioritaton ĉe asociaj aranĝoj. Tio estas kutime farata okaze de kursoj, kiuj havas rabaton por asocioj — ne malfacilus etendi tiun sistemon al aliaj agadkampoj, kiaj ekz. al la Libro-Servo.

Praktikajn problemojn de tiu aliro estas ankaŭ nun facile solveblaj, kompare kun iama tempo. Realtempa kotizkontrolo, per aliro al fora datenbazo aŭ per facile aktualigebla membrkarto estas nuntempe bagatelo.

### Novan strategion per novaj rimedoj

Sisteman esploron pri “membrigeblaj” aŭ “membrigindaj” homoj la estraro komencis aŭtune de 2001, per listigo de tiamaj pli malpli ĵusaj informpetintoj, konataj komencintoj, ial ne membrigintaj esperantistoj.

La reto montriĝis tre fertila “ĉasejo”: la traserĉado de blogoj, forumoj kaj “gastlibroj” malkovris multajn ekesperantistojn kaj seriozaj interesiĝantojn, kiujn oni sekve kontaktis.

Tiu listo enhavas nun 358 nomojn kaj multaj el la detiamaj novaj membroj (27 el 45) pasis tra ĝi. El la tuto, 68 estas en fako de «klare membrigindaj» (temas ĉefe pri progresantoj) kaj pluaj 138 en fako de «aparte priatentindaj» (ĉefe sukcesaj eklernintoj).

La estraro tiujn regule kontaktas, apogas pri lernado kaj pri movadaj uzebloj, kaj sciigas pri la ebleco membriĝi — kio okazas pli malpli baldaŭ. Tiel rekreskas (\*) nia anaro, pli malrapide — sed pli solide ol iam ajn antaŭe. ■

(\*) Pri malkresko kaj rekresko vd. NB83:6-7. Notindas ke komence de 2005 tendenco ŝanĝiĝis kaj la nombro de novaj membroj komencas superi la eksigojn.

KINO:

## Vamprojn ĉasi en esperanto!

Jen *Blade Trinity*, tria filmo de la serio *Blade*, kinas nun. Ree la vampirĉasisto (li mem sangsuĉema) atakas kaj, kvankam la trian fojon, ĝi ankoraŭ sukcesas enhavi surprizojn. Sed kio vere surprizigis min estis aŭdi esperanton en tiu usonkomerca filmo!

Fakte, estas almenaŭ tri scenoj kie mi trafis tion: **1.** kiam Whistler (esperante) alparolas vendiston (estas eĉ subtitoloj!); **2.** la filmo *Incubus* (\*) aperas du aŭ trifoje televide; **3.** ĉe policeja enirejo legeblas kaj "police station" kaj "policejo". Laŭdire la plejmulto de afiŝoj kaj reklamoj estas dulingvaj sed mi ne rimarkis.

Tio okazis ĉar, laŭ la filmverkisto, la plejmulto de (usonaj) urboj estas dulingvaj do, ĉar en *Blade* la rakonto okazas en iu ajn urbo, esperanto aperis kiel logika elekto.

La filmo mem ne estas tiom spektinda, ĉefe se vi ne ŝatas vampirajn, eksplodajn, luktajn, “nigrajn” filmojn. Atendu DVDn.

Pri esperanto mem, la nura bedaŭro estas ke kaj William SHATNER kaj Kris KRISTOFFERSON tiom fuŝe parolas ĝin... **Nuno MAGALHÃES**

(\*) *Incubus*: usona eksperimenta artfilmo (1965), tute en esperanto; rolas la famiĝinta William SHATNER.

## BULTENO:

*Erat-umo*

Pro spacmanko ne aperis en la pasintaj numeroj erarlisto de ĉiu antaŭa

n-ro	Pg.	klm.	skc.	lin.	de	al
85	3	2	1	-7	24,00 €	25,20 €
85	3	1	2	-2	antaŭe tre aktiva	jam antaŭe tre aktiva,
85	4	1		-3	“sen”	“sen-data”
85	6	1	2			(foto 2 tro helas)
85	7	1	1	7	radiaj	radia
85	10	1	1	-4	askultigis	aŭskultigis
85	10	1	2	-1	kurso	kurso.
85	10	2	2	-1	vd	vd.
85	10	2	3	-3	tiam	iama
85		3-11	(1)		2002.07-10	2002.07-09
85	12	1	1-2		"sp" kaj "st" estu sen t.n. "malnovstila literligo"	
84	1			2	Aprilo-Majo • Abril-Maio	Aprilo-Junio • Abril-Junho
84	2	1	1	3	apr.-maj.	apr.-jun.
84	2	1	2	19	84+(84)	84+(94)
84	2	1	2	-8	Luís LADEIRA (eks.)	Luís LADEIRA (eks.) luri GASPAR (anst.)
84	2	2	1	-1	Red.	red.
84	2	2		3	(mankas "(sonregistroj) Carlos MOREIRA")	
84	2	2		4	Rocha da COSTA	(vakas)
84	2	2		12	Unua Loka	Loka Unua
84	5	1	2	-11	José,	José
84	5	1	2	-9	919 711 756	919 645 079
84	7	1		12	Jam	Jame
84	7	1		-7	AM	AMT
84	7	2		8-10	estis aprobata de la Ĝenerala Asembleo du tagojn poste.	estis samtage aprobata de la Ĝenerala Asembleo.
84	9	1		4	"kvas"	"kvas"
84	9	1		-2	Kovrov	<i>Kovrov</i>
84	9	2		-13	Centro (°)	Centro
84	9	2		-6	miaurbe malgraŭ	miaurben (°) malgraŭ
84	11	2	2	1	MOVADO:	EKSTERA MOVADO:
84	11	2	2	6	Avante	Avante!
84	11	2	2	-3	Andre	André
84	12				Tábua O	Tábua O
83	1	2			R.R.	(R.R.)
83	2	2	1	-2	(mankas "(R.R.)" apud foto)	
83	2	2	1	-2	samtempe profundan	samtempe kaj profundan
83	2	2	1	-1	Red.	red.
83	2	2		3	(mankas "(sonregistroj) Carlos MOREIRA")	
83	2	2		4	Rocha da COSTA	(vakas)
83	2	2		12	Unua Loka	Loka Unua
83	3	1	1	5	Renkoniĝo	Renkontiĝo
83	3	1	2	-8	2002	2003
83	3	1	2	-3	2003	2004
83	3	2	2	-1	AMT	red.

numero. Eĉ se plej multaj estas ne-gravaj tajpimisoj iuj indigas plenan publikigon. (Kiel multo alia, NB-erarlistoj troveblas en la asocia paĝaro, en <http://www.esperanto.web.pt/nb.htm>).

n-ro	Pg.	klm.	skc.	lin.	de	al
83	3	2	2-3		(tekstoj interŝanĝitaj)	
83	4	2	1	2	jam 40 jarojn	ekde 1947
83	4	2	2		(mankas "(R.R.)" apud bildo)	
83	5	1	2	-3	Post konfeso pri mia neradikalemo	Konfesinte mian neradikalemon
83	6		2		(mankas pluraj vertikalaj linioj)	
83	6		2		▯▯▯	▯▯▯ novaj
					▯▯▯	▯▯▯ eksaj
					-□-	-□- totalo
					⊕	⊕ %inoj
					Δ	Δ %sub30j
83	8	1		10	farus	faros
83	8	1		11	estus	estos
83	8	1		10	Fakte la	Fakte tiu
83	8	2		-4-5	ĉe tablaĵn	ĉetablaĵn
83	9	2	1	6	nome de	per alvoko de
83	9	3	1	6	titolo	titolo <i>Sursablaj Floretoj</i>
83	9	3	1	7	la enhava	enhava
83	9	2	2	6	HTML-eksperto	HTML-eksperto
83	9		4	1	(tro da spaco sub "dato priskribo fonto")	
83	10	2		-17	Tiam	Kiam
83	11	2		16	ĉiam	ĉiam
83	11	2		-5	ĉian	ĉiam
83	11	2	3	2	Studentoj	Lernantoj
83	12				(mankas krampoj ĉirkaŭ "R.R.", trifoje)	
82	3	2		11	Post,	Poste,
82	3	2		12	dorssakoj surmetitaj	dorssakojn surmetinte
82	4	1		-20	lacitaj	lasitaj
82	4	1		-1	senesperu	malesperu
82	4	2	1	3	Aperis	Aperis
82	4	4	3	2	okazis en	okazis la sepan de junio, en
82	4	2	3	5	<i>Ĥhavo</i> )	<i>Ĥhavo</i> ),
82	4	2	3	10	dekseso	deko
82	5	2	1	4	julie	junie
82	5	2	1	10	lernintoj)	lernintoj),
82	5	1	2	-1	faris	faras
82	6	1		11	malsaniĝo,	malsaniĝo
82	6	1		17	(kunaŭtoras	(li kunaŭtoras
82	9	2		-12	ZAHRA	Zahra
82	9	2		-12	Nabi Zade	NABI ZADE
82	9	2		20	surfote	deksote surfote
81	2	3	2	10	(mankas "IKEK: Alcino ALVES")	
81	3	2	1		(tro dika streko)	
81	3	2	2		(tro dika streko)	
81	4	2	1	9	veterantoj	veteranoj
81	5	2	1	4	<i>Porto Alegre</i>	<i>Pôrto Alegre</i>
81	5	2	1	18	<b>Jozefo PACHECO</b>	<b>Jozefo PACHECO</b>
81	6	2	1		(mankas "JOOST WITVEEN" apud foto)	
81	6	1		20	naciaj, regionaj kaj minoritataj lingvoj	naciajn, regionajn kaj minoritatajn

n-ro	pg.	klm.	skc.	lin.	de	al
81	7	1		22-25	bijuterio, bonsajo, brodkasti, eŭsko, famiento, gejo, ha-pakso, hiki, insinui, inteligencio, kidnapi, kozo, mar-fruktoj	<i>bijuterio, bonsajo, brodkasti, eŭsko, farniento, gejo, ha-pakso, hiki, insinui, inteligencio, kidnapi, kozo, mar-fruktoj</i>
81	7	1		26-27	nifo, pederasto, pejorativa, printi, resurso, samizdato, sponso, ŝlagro, zapi	<i>nifo, pederasto, pejorativa, printi, resurso, samizdato, sponso, ŝlagro, zapi</i>
81	7	1		30-35	anatifio, berni, ĉendi, dikcio, doso, fabulo, gardero, groba, harniso, kalkeo, kardigano, maskoto, mediokra, miŝmaŝo, mohikano, mustaĉo, notora, paŭpera, piscino, pucelo, sefo, sensuala, silvo, skatologio, stupida	<i>anatifio, berni, ĉendi, dikcio, doso, fabulo, gardero, groba, harniso, kalkeo, kardigano, maskoto, mediokra, miŝmaŝo, mohikano, mustaĉo, notora, paŭpera, piscino, pucelo, sefo, sensuala, silvo, skatologio, stupida</i>
81	7	2		1	suveniro	<i>suveniro</i>
81	7	2		5	ŝaperono, Taĵo	<i>ŝaperono, Taĵo</i>
81	7	2		6	Taĥo	<i>Taĥo</i>
81	7	2		6	Tago	<i>Tago</i>
81	7	2		6	treso	<i>treso</i>
81	7	2		7	vokablo	<i>vokablo</i>
81	7	2		11-12	burgero, ĉipsoj, dropso, hamburgero (= burgero), pomfrito, sangrio, ŝnapso.	<i>burgero, ĉipsoj, dropso, hamburgero (= burgero), pomfrito, sangrio, ŝnapso.</i>
81	7	2		14	bagaso	<i>bagaso</i>
81	7	2		18	klementino	<i>klementino</i>
81	7	2		19	mudo	<i>mudo</i>
81	7	2		21	muslo	<i>muslo</i>
81	7	2		22	muslio	<i>muslio</i>
81	7	2		24	pirekso	<i>pirekso</i>
81	7	2		25	sevo	<i>sevo</i>
81	7	2		26	skvaŝo	<i>skvaŝo</i>
81	7	2		27	spagato	<i>spagato</i>
81	7	2		29	stukaĉo	<i>stukaĉo</i>
81	7	2		34	biaso	<i>biaso</i>
81	7	2		34	defensi	<i>defensi</i>
81	7	2		36	drajvi	<i>drajvi</i>
81	8	1		1	uperkuto	<i>uperkuto</i>
81	8	1		6-7	buĥto, frandzi, midzi, horso, kaki, porno, vampo.	<i>buĥto, frandzi, midzi, horso, kaki, porno, vampo.</i>
81	8	1		8-9	forniki, fotri, kundo, puo	<i>forniki, fotri, kundo, puo</i>
81	8	1		9	franĉi	<i>franĉi</i>
81	8	1		10	frandzi	<i>frandzi</i>
81	8	1		11	melki	<i>melki</i>
81	8	1		15	Duenjo	<i>Duenjo</i>
81	8	1		17	femino, hihii	<i>femino, hihii</i>
81	8	1		21	vanui	<i>vanui</i>
81	8	1		24	impedi, hungro	<i>impedi, hungro</i>
81	8	1		26	aliel kaj alies	<i>aliel kaj alies</i>
81	8	1		28	(evi)	<i>(evi)</i>
81	8	1		29	-unt- kaj -ut-	<i>-unt- kaj -ut-</i>
81	8	1		34	aperti	<i>aperti</i>

n-ro	pg.	klm.	skc.	lin.	de	al
81	8	1		35	korekti — korekta	<i>korekti — korekta</i>
81	8	1		36	fiksi — fiksa	<i>fiksi — fiksa</i>
81	8	2		7	lesboj, sed lesbaninoj	<i>lesboj, sed lesbaninoj</i>
81	8	2		14	salajro	<i>salajro</i>
81	8	2		29	piĉo	<i>piĉo</i>
81	8	2		31	bambuso	<i>bambuso</i>
81	8	2		32	bambuzo. Jen fine arbedo	<i>bambuzo. Jen fine arbedo</i>
81	8	2		41	trunkarbusto kaj tufarbusto	<i>trunkarbusto kaj tufarbusto</i>
81	9	1		5-10	ajlo — aliumo; fazeolo — fazeoluso; lolo — lolio; kaŝtano — kastaneo; piro — piruso; pistako — pistacio; pruno — prunuso; salmo — salmono; polpo — oktopodo; vesperto — vespertiliono,	<i>ajlo — aliumo; fazeolo — fazeoluso; lolo — lolio; kaŝtano — kastaneo; piro — piruso; pistako — pistacio; pruno — prunuso; salmo — salmono; polpo — oktopodo; vesperto — vespertiliono,</i>
81	9	1		30	ŝpaloj	<i>ŝpaloj</i>
81	9	1		32	ŝotro	<i>ŝotro</i>
81	9	1		34	senŝotrigi	<i>senŝotrigi</i>
81	9	1		36	trunko	<i>trunko</i>
81	9	1		37	ŝtoko	<i>ŝtoko</i>
81	9	1		37	ŝpatoj	<i>ŝpatoj</i>
81	9	1		39	ŝtreboj	<i>ŝtreboj</i>
81	9	1		40	stajoj	<i>stajoj</i>
81	9	1		42	stegoj	<i>stegoj</i>
81	9	2		2	escoras	<i>escoras</i>
81	9	2		3	runjoj	<i>runjoj</i>
81	9	2		24	staila angulo	<i>staila angulo</i>
81	10	1	1		Rodrigo	<i>Antonio VALÉN</i>
81	10	2	1	15	malhela	<i>metala</i>
81	11	1	3	5	per	<i>post</i>
81	11	1	3	8	informpetoj	<i>informpetojn</i>
81	12	1	2	18	kribitaj	<i>kribitaj</i>

## OPINIO:

*Signalojn el la bru'*

NB85 raportis du ĉefajn eventojn de nialanda movado en 2004: SIC kaj *A Ilha do Futuro*. Tiuj raportoj estis kopie senditaj (kun modifoj taŭgigaj al internacia publiko) al la retroŝta diskutlisto Landa Agado. **Malgraŭ** la intensa partopreno tie de la UEA-estrarprezidanto, nenio pria aperis en la UEA-gazeto *esperanto*. Aŭ eble “**graŭ**” — ja inter tiom eksteremaj mesaĝoj kaj mispublikigitaj reagoj kiuj tie cirkulas, facilas maltrafi ion interesan... *Ancxjo*

La movado **havis** SEMAJNON  
... ĝi kostis 208 eŭrojn  
... ĝi aperis unu semajnon

La movado **havas** MONATON  
... ĝi kostas nur 44 eŭrojn\*  
... ĝi aperadas jam 25 jarojn

La movado **havos** MONATON  
... dum la movado abonas ĝin  
... MONATO bezonas pli da movado

**VI ESTAS LA MOVADO**  
... Vi bezonas MONATON  
... MONATO bezonas Vin

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, moderna vivo, scienco, kulturo kaj multe pli.

Petu provnumeron de MONATO,  
Frankrijkei 140, 2000 Antwerpen, Belgio,  
aŭ pretere de [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

\*En difinitaj landoj la prezo povas esti alia. Petu informojn de [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

REMETENTE:

**Associação Portuguesa de Esperanto**  
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A  
PT-1500-239 LISBOA  
PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio  
*annúmero*

últ. quota paga  
*lasta kotizpago*

foto  
*foto*

laste ricevita  
interŝanĝnumero